

STARTO

N-ro 4/2021 (281)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Ni kongresis samtempe en Bartošovice kaj Beroun
1 – 3 oktobro 2021

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz (retejo, muzeo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 603 264 003, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datum-bazo, kontado)

Komitatano: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světlice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Komitatano: Andrea Švubová, Brněnská 3474-32A, 695 01 Hodonín, tel. 604 850 689, a.svubova@email.cz (konferencioj, kongresoj, kunlaboro kun ĈEJ, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/
www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy
www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/
www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

Konferenco de ĈEA en Bartošovice

1 – 3 oktobro 2021

La ĉi-jaran konferencon de nia asocio en la kastelo Bartošovice (apud Studénka) partoprenis ĉ. 40 personoj, sed samtepe kongresis niaj fervojistoj en Beroun (22 personoj), ĉar pro la politikaj elektoj la posedanto de trankonkto ne donis al ili alian eblon. Multaj homoj restis prefere hejme pro pandemio.

La vendredan programon malfermis komponisto Ivan Acher kun kantistino Vanda Šípová el Nacia Teatro en Prago, kiuj prezentis ariojn el la opero Sternenhoch kaj ankaŭ arion de Najado pri la luno de A. Dvořák. Ambaŭ artistojn intervjuis televido Polar Ostrava, kelkajn vortojn diris ankaŭ Pavol Kaščák kiel organizanto de la konferenco.



Sabata antaŭtagmezo estis dediĉita al ĉefa traktado de la konferenco. Post la Esperanta himno malfermis la konferencon vicprezidanto Jiří Tomeček, senkulpigante la prezidantinn, kiu pro gravaj familiaj okazaĵoj devis reveni hejmen de la trajno.

Post minuto da silento omaĝe al forpasintoj 2020-2021, la kasisto Vratislav Hirš prezentis raporton pri mastrumado de la asocio, komitatano Leonarda Chaloupková trailegis raportojn de la kluboj pri ilia agado, kion Andrea Švubová kompletigis per informo pri agado de fervojistoj.

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio Petr Chrdle informis pri la nombro de individuaj membroj de UEA kaj ankaŭ pri novaĵoj el sia eldonejo KAVA-PECH.

Sekvis informo pri la venonta kongreso Pardubice 2022 (L. Chaloupková, E. Pazourková) kaj elekto de elekta komisiono, kies tasko estos proponi novan asocian komitaton. Por la komisiono estis elektitaj: Vratislav Hirš, Stanislava Nováková kaj Miroslav Vaněk.

Dum diskuto parolis Kvido Janík, Miroslav Vaněk, Jaroslav Suchánek, Josef Kalčík, Vratislav Hirš, Miroslav Malovec, Petr Chrdle.



Vanaivan

Posttagmeze la konferencanoj ekskursis buse al Kopřivnice, kie en skolta centro Vanaivan troviĝas Esperanto-ŝtono el 1948, kaj al Štramberk, kie kelkaj grimpis al pinto de belvidejo „Štramberská trúba“.



Štramberk

La vespero denove apartenis al koncertoj, unue al plenkreskula kantista grupo KOS Nový Jičín, poste al adoleskaj knabinoj „Cérky“.



Dimanĉe matene oni daŭrigis la konferencan traktadon.

O. A. Fischer prelegis pri KELI-kongreso en la pola Legnica, V. Hirš alvokis pri proponoj por nova asocia prezidanto, M. Malovec informis pri asociaj ekzamenoj, M. Tomečková pri korespondaj kursoj.

L. Chaloupková legis retmesaĝon de la prezidantino L. Hýblová.

Fine estis traktata kaj akceptita rezolucio de la konferenco.

Dum la tuta konferenco funkciis ankaŭ libroservo (M. Čumová) kaj la plej juna partoprenanto S. Švub la agadon filmis.



Usnesení konference

Českého esperantského svazu,
která se konala v Bartošovicích
od 1. do 3. října 2021

Konference ČES:

Schválila zprávu o hospodaření a o členské základně ČES přednesenou pokladníkem V. Hiršem.

Vzala na vědomí zprávu o činnosti klubů přednesenou L. Chaloupkovou.

Se seznámila se stavem digitalizace Paměti hnutí přednesenou M. Malovcem.

Se seznámila se zprávou delegáta UEA P. Chrdleho.

Zvolila volební komisi pro volby do výboru v roce 2022 ve složení: Vratislav Hirš, Stanislava Nováková, Miroslav Vaněk. Komise na svém zasedání zvolila Vratislava Hirše jako svého předsedu. Předseda komise vyzval přítomné ke spolupráci při hledání kandidátů na předsedu ČES a další členy výboru.

Vzala na vědomí pořádání sjezdu Českého esperantského svazu v Pardubicích ve dnech 16.-18. září 2022.

Vzala na vědomí pořádání konference Českého esperantského svazu ve Strážnici ve dnech 15.-17. září 2023.

Se seznámila s historií pořádání svazových zkoušek a stavu korespondenčních kurzů. Vyzývá výbor k úpravě cen korespondenčních kurzů a nabídnutí úvodní lekce kurzu zdarma.

Se seznámila s novými knihami nakladatelství KAVA-PECH.

Vyzývá výbor k obnově nabídky reklamních předmětů (trička s esperantským zápisem, samolepka na auto – Esperanto)

V Bartošovicích 3. října 2021



Fervojistoj kongresis kaj kongresos en Beroun

Niaj fervojistoj aŭtune tre aktivis.

■ Inter la 17-a ĝis 19-a de septembro 2021 en Fervojmuzeo en *Lužná u Rakovníka* estis festata **Tago de Fervojo** fare de Ĉeĥaj Fervojoj. Sian lokon kiel kutime ricevis ankaŭ diversaj grupoj, inter ili fervojistoj-esperantistoj sub gvido de Ladislav Hakl. Ĉe lia tablo haltis eĉ fervoja direktoro Ivan Bednárik kun ministro Karel Havlíček.



■ Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio kongresis en Beroun (1.-3.10.2021), do en loko, kie estas planata la tutmonda IFEF-kongreso 2022. Enkadre de la konferenco okazis jarkunveno kaj promeno tra la urbo.



■ Eŭropaj fervojoj: historio – nuntempo – estonteco

Sub tiu ĉi titolo okazis la 12-an de oktobro 2021 internacia faka seminario ĉe Universitato Pardubice, parte ĉeeste (18 homoj), parte virtuale (21).



IFEF estis prezentita kiel organizo ne nur por fervojistoj, oni rememoris epokon de vaporlokomotivoj, provis klarigi kaŭzojn de fervojaj akcidentoj kaj eblojn de sekurigado de trak-nivelaj pasejoj, ne estis forgesitaj modernaj teknologioj kun naturprotektaj celoj inkluzive de disvolviĝo de fervoja infrastrukturo en ĈR.

■ **La 73-a IFEF-kongreso** estas planata por la tagoj inter la 6-a ĝis 11-a de majo 2022 en Beroun. La kongreso okazos en la hotelo Grand Litava. Apud fakaj prelegoj vi povos partopreni plurajn ekskursojn (Křivoklát, Lužná, vitrofabriko Nižbor).

■ Al **postkongreso** vin invitos la historia urbo Pardubice.


Aliĝilojn kun provizora programo vi trovos ĉe <http://kongreso.wz.cz>

Kiel praktiki Esperanton dum longaj vintraj vesperoj?

Kelkaj interretaj inspiroj por vi

Esperanta Retradio

Esperantaretradio.blogspot.com



Pli ol 10 jarojn gvidata de Anton Oberndorfer el Aŭstrio, kiu kun siaj kolegoj el pluraj landoj aperigas ĈIUTAGE kelkminutan altkvalitan sonprogramon kun akompana teksto, pri interesaj kaj esperigaj novaĵoj pri kulturo, sanzorgo, psikologio, edukado, scienco kaj tekniko, historio k.a. fakoj. Kiel orientiĝi en la retejo vi povas legi en la [aktualaĵo en Esperanto.cz](#) el 3.12.2021.

Verkoj.com



Unika projekto por legemuloj (ĉu komencintoj, ĉu progresintoj)! Kvardeko da nuntempaj verkistoj kaj tradukistoj el la tuta mondo disponigas por vi senpage siajn tekstojn kaj librojn! Troveblas en ĝi prozo, poemoj, teatraĵoj, sed ankaŭ fakaj artikoloj, ŝercoj, bild-serioj k.a..

Bv. skribi al redakce@esperanto.cz, kiuj kontribuaĵoj plaĉis al vi kaj kial, ni volonte plu rekomendos ilin!

La videokanalo

Esperantista Klubo Brno / Klub esperantistů Brno ĉe Youtube



estis kreita antaŭ 2 jaroj kaj prizorgatas de la nuna kluba prezidanto Milan Kolka. Komence de decembro 2021 ĝi entenis 42 videoregistraĵojn de la diverstemaj programoj de la klubaj kunvenoj. En oktobro kaj novembro estis alŝutitaj jenaj videoj, kiujn (same kiel la aliajn) vi estas bonvenaj spekti. Pluaj sendube sekvos:

- *Konciza historio de E-klubo Brno*
- *Flaŭro de Brno*
- *Kristana Kongreso en Pollando*
- *Praga printempo kaj soveta okupacio en la jaro 1968 per miaj okuloj*
- *Renormaligado per miaj okuloj*
- *Francjozefaj Insuloj kaj J. Payer*
- *Kiel oni faras vortaron*

Ridejo.ikso.net



Humuro estas potenca kuracisto kaj ĝi bezonatas nun pli ol aliam! En tiu ĉi reta projekto de la organizo E@I vi povas trovi preskaŭ du mil anekdotojn, grupigitajn en 30 temkategorioj. Vi povas ne nur esplori, legi kaj ridi, sed ankaŭ voĉdoni por la plej bona kaj eĉ mem proponi propran ŝercon! Bonan amuziĝon!

Pavla Dvořáková

120 jaroj de Esperanto klubo Brno

La 18-an de septembro 2021 kunvenis en palaco Nosreti en Brno klubanoj kaj gastoj por rememori la fondon de la klubo la 27-an de oktobro 1901. Venis ĉirkaŭ 30 personoj.



Pavla Dvořáková el Písek persone ne partoprenis, sed sendis kelkajn kantojn, kiuj estis uzitaj inter unuopaj programejoj kiel muzika pliriĉigo de la programo. La unua estis himno La Espero, kiu inaŭguris la tutan solenaĵon.



Unue estis lanĉita nova libro Kosmofabeloj (ĉeĥe Vesmírníčky) de verkistino Gabriela Kopcová. La libron esperantigis Miroslav Malovec kaj eldonis la eldonejo KAVA-PECH de Petr Chrdle. La

aŭtorino venis kun kelkaj siaj amikoj, kiuj kun ŝi foriris post la ceremonio. En Ĉeĥio estas kutimo "bapti" novajn librojn (verŝi sur ilin iom da vino), sed ĉar tio damaĝus la libron, la aŭtorino, tradukinto kaj eldoninto prefere la vinon fortrinkis kaj deziris al la libro sukceson ĉe la legantoj.



Petro Chrdle prezentis ankaŭ aliajn siajn eldonaĵojn inkluzive de la preparataj.

La solenan programon komencis la kluba prezidanto Milan Kolka per rememoro pri klubanoj, kiuj forpasis dum la lasta jardeko, al kiuj li aldonis ankaŭ slovakon esperantiston Ján Vajs, kies morto tri tagojn pli frue ĉiujn ŝokis.

Post mallonga paŭzo Miroslav Malovec prezentis la historion de la klubo. Unue li priskribis fondadon de la klubo, kiu daŭris pli ol unu jaron pro burokrataj malhelpoj flanke de la polica direktorejo, poste li emfazis la plej gravajn eventojn: radio-elsendojn de Verda Stacio, tutŝtatan kongreson en 1950 kun pli ol mil partoprenantoj, klubajn teatraĵojn kaj koncertojn en la tempo, kiam ĉesis ekzisti la tutŝtata Esperanto-organizo kaj

ĝia gazeto, la konstitucian kongreson de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en marto 1969 (kiu kompreneble devis estiĝi en la sama loko kiel la unua organizo), fondon de la ĉeĥa Vikipedio per traduko el Esperanto (2002), starigon de Ĉeĥa Esperanto-Junularo (2005), esperantlingvan operon Sternenhoch por Nacia Teatro en Prago (2018) kaj literaturajn verkojn preparitajn de la klubanoj dum la historio.



La kunvenon salutis la asocia prezidantino Libuše Hýblová kaj komitatano Leonarda Chaloupková.

Pri la flaŭro de Brno prelegis Oldřich Arnošt Fischer, kiu poste ankaŭ promeniĝis kelkajn gastojn tra la urbo.



Ambaŭ prelegoj estas elŝuteblaj en la kluba retejo.



Ne mankis gastoj el aliaj kluboj kaj venis ankaŭ gejunuloj el Aŭstrio, kiujn venigis Václav Zouzalík. Aperis eĉ nova interesato pri Esperanto kun sia filo.



Legemuloj povis aĉeti librojn ĉe tablo kun provizora kluba libroservo. Ĉiuj partoprenantoj ricevis presitan historion de la klubo inter la jaroj 2011-2021 kiel aldonon al la antaŭaj broŝuroj (ĉiuj elŝuteblaj en la kluba [retejo](#)) kaj tute novan *Malgrandan gvidilon tra Brno* elŝuteblan en la retejo de Turisma Informa Centro (ligilon vi trovos en la kluba retejo inter publikaĵoj).



-mm-

Esperanto – fenestro en la mondo



Merkrede la 13-an de oktobro 2021 vizitis 11 niaj klubanoj de EK Ostrava-Vítkovice ekspozicion de bildkartoj kaj korespondadoj „Esperanto – fenestro en la mondo“, aranĝitan de EK Havířov okaze de la 65-a datreveno de fondo de la Esperantista klubo ĉe Urba Kulturcentro Havířov en galerio de Komerca Centro Elan.



Krom la membroj el Ostrava partoprenis la renkontiĝon ankaŭ Karel Madzia el Třinec, Vlastimil Kočvara el Opava kaj kompreneble lokaj esperantistoj, kiuj nin bonvenigis kaj ĉiĉeronis tra la ekspozicio.



Post la ekspozicio ni pasigis agrablan horon en kafejo, kie ni ĉe bona kafo kaj tortetoj pritraktis historion kaj nuntempon de niaj kluboj kaj cerbumis pri eblaj komunaj aranĝoj en estonteco.

Jarka Čejková



Amikoj el Danlando denove nin vizitis

En 2009 Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy ligis kunlaboron kun danaj esperantistoj dank' al Jan Nieman el Ballerup. Jan donacis al Esperanto-Muzeo en Svitavy multajn librojn. Transporti pluajn librojn el Danlando al Svitavy helpis al ni estroj de uzino Fibertex Svitavy, pro kio apartenas al ili nia danko.



Por la ĉi-jara internacia foto-ekspozicio FISAC estis elektita ĝuste urbo Svitavy. Jan Niemann estas nome ankaŭ prezidanto de fervojista sekcio por fotografado en internacia skalo, kvankam li finis tiun funkcion ĝuste ĉe ni. Ĵaŭde la 14-an de oktobro 2021 ni renkontiĝis kun niaj danaj geamikoj Jan kaj Lene Nieman el Ballerup kaj Helle Enyolbrecht el Helsingør kaj pasigis komune agrablan posttagmezon. Jan denove alportis por la muzeo librojn, kiuj en nia kolekto ankoraŭ mankis. Al niaj novaj amikoj ni montris internon de Ottendorfer-domo. Ni diskutis pri Esperanto-movado nialande kaj en Danlando kaj planis novan renkontiĝon.



El donacitaj libroj

Jan ligas nian kunlaboron kun la germana Herzberg, kie ankaŭ estas Esperanto-muzeo. Ni interkonsentis pri nova kunveno post IFEF-kongreso venont-jare en Beroun. Nia klubo provos plani la programon por pluraj tagoj kaj prezenti ne nur la urbon Svitavy, sed ankaŭ iom vastan ĉirkaŭaĵon.

Libuše Dvořáková



Laŭ spuroj de Theodor Kilian

La 16-an kaj 17-an de oktobro 2021 membroj de Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy ekvojis laŭ spuroj de fama esperantisto, tradukanto, pedagogo kaj aŭtoro de Esperanto-lernolibroj, Theodor Kilian. Sian migradon ili komencis ĉe la iama domo de Theodor Kilian en la strato *Esperantistů* (de esperantistoj) en Třebíč. La domon jam riparas nova posedanto. Ni daŭrigis la vojon laŭ planita dutaga programo.



Ni vizitis atom-elektrejon Dukovany, kie oni klarigis al ni ĝian funkciadon kaj certigis, ke la produktantoj de atom-elektrejoj jam ellaboris tiom kvalitajn sekurecajn ekipaĵojn, ke minacas nenia danĝero. La elektrejo ĉerpas akvon el proksima akvorezervujo Dalešice, tial ni forveturis tien rigardi. Danke al bela vetero ni ĝuis ĉarman naturon ĉirkaŭ la digolago kaj ni eĉ grimpis al belvidejo Wilson super la lago. Bedaŭrinde, la lastan turisman ŝipon, kiu navigas dum la tuta jaro, ni maltrafis. La dimanĉan antaŭtagmezon ni dediĉis al vizito de „Slava epopeo“ de Alfons Mucha en la kastelo de Moravský Krumlov. Dum la

tuta posttagmezo ni vagis tra Ivančice – naskiĝloko de pentristo Alfons Mucha, aktoro Vladimír Menšík kaj esperantisto Theodor Kilian. Atendis nin malgrabla surprizo, kiam en Informa Centro deĵorantino sciis nenion pri Theodor Kilian. Ni rigardis ekspozicion pri Vladimír Menšík, haltis ĉe Elementa Lernejo Vladimír Menšík, kie sur fasado estas surmurigita lia busto.


Esploron ni devis daŭrigi hejme. Jan Richtr trovis en la interreto elskribaĵon el matrikulo, kie estas registrita Theodor Kilian inkluzive de liaj gepatroj kaj loko, kie staris la naskiĝdomo. La elskribaĵo montras, ke la avino de Theodor estis fraŭline Muchová kaj devenis el vinfarista familio same kiel Alfons Mucha. Ekzistas eblo, ke Theodor Kilian kaj Alfons Mucha havis komunajn antaŭulojn. La loko de la naskiĝdomo de Theodor Kilian nun troviĝas ĉe la adreso Horní Hlinky 77. Sinjorino Seková el Svitavy estis tiutempe en Ivančice kaj la lokon fotis. El la tuta bieno restis nur unu pajlotenejo.

Ĉar ni ne volas, ke la nomo de Theodor Kilian en lia naskiĝloko estu forgesita, mi alparolis la Magistraton Ivančice kaj Informan Centron kaj proponis helpon kun instalo de negranda permanenta ekspozicio pri Kilian. La urbo ĝis nun ne montris intereson. Kontraŭ la naskiĝdoma loko troviĝas eta parko, kie povus esti ŝtono kun memortabulo simile kiel monumento de Oskar Schindler en Svitavy, ĉar la posedantoj ne volis havi memortabulon sur la muro. Eble valorus pripensi tion.

Libuše Dvořáková

KAREL HAVLÍČEK BOROVSÝ kaj Brikseno

Ĉijare ni rememoras la 200 jarojn de la naskiĝo, 170 jarojn de la ekzilo, 165 jarojn de la morto – de Karel Havlíček Borovský.



„Dio, donu al mi, ke mi estu diligenta, por ke Ĉeĥoj iam ĝoju pri mi“... ni eksplikas lian devizon, kiun li starigis al sia „animblazono“, estante ankoraŭ infano, ĉar ĝi diras jam antaŭe, pri kia personeco estos nia parolo.

Karel Havlíček Borovský (1821 – 1856) naskiĝis kaj vivis en la tempo, kiam la landoj de la historia ĉeĥa regno apartenis al Aŭstria monarkio sub absolutisma kaj reakcia regado de Habsburgoj. Li estis la unua ĉeĥa moderna ĵurnalisto de granda formato kaj mondlarĝa horizonto. Li estis ankaŭ flagranta batalanto kontraŭ la ĉiopova despotismo de la ŝtato, sub kies polica maŝinaro li tamen fine falis. Post la malsukcesinta revolucio 1848 li donis siajn servojn kontraŭ la reakcioj ŝtata kaj eklezia. Nek la juĝa persekutado, nek la cenzurado kaj malpermeso de gazetoj redaktataj de li, nek polica deporto en la tirolan urbon Brikseno (germ. Brixen, itale Bressanone) rompis lian karakteron.

„Iu devas elteni – kaj tiu estos mi“, karakterizas lin en lia plenkreska aĝo same, kiel la supre menciita moto. Ke temis pri la persisto karaktera, estu substrekite! Ĝuste en Brikseno li kreis siajn plej elstarajn verkojn, inter ili la drastan satiron, kies originala titolo estas: Bapto de caro Vladimir. Li bazis ĝin sur kelkaj epizodoj el la antikva kroniko de la monaĥo Nestoro, pri kristanigo de Ruslando sub la princo Vladimir. Sed li poezie adaptis la legen-

don kaj traplektis ĝin per amindaj anakronismoj, salte transportante la leganton el la frutempo de la rusa kristanismo en la mezon de la aŭstria absolutisma ŝtato.

El tre ampleksa satiro ni ĝuu almenaŭ parton, kiu eksplikas jenon: Vladimir, rusa princo, kiu en la jaro 988 akceptis la kristanan kredon de la greka (ortodoksa) eklezio, ordonis faligi statuon de la pagana dio Perun (dio de fulmotondro), ligi ĝin al la vosto de ĉevalaĉo kaj ĵeti en la riveron Dnepro.

Oni al la vost' ĉevala
lin, la dion, ĉenis
ambaŭkrure kaj nun kure
sur la ŝtonoj trenis.

Ĉirkaŭ tiu ridinde komika historieto Havlíček elfabelis sian groteskan rakonton pri la ŝtata ĉiopovo, pri policaj praktikoj kaj la homa malsaĝeco. Kaj ĉi tie ni jam menciis la nomon, kiu meritas esti menciita: Tomáš Pumpr. Ni ĝuu lian tradukon en aminde belega Esperanto.

Kiu konas, same kiu ĝis nun ne aŭdis – ni ĉiuj estas ravitaj per la spritaĵoj, des pli, ke la tuta poemo havas racian kernon, eĉ kio rilatas aktuale al Havlíček mem. Estas la loko substreki, ke ekzilita li estis ne nur kiel spitulo kontraŭ la aŭstria administrado kaj ties surpremado, sed same pro sia forta kontraŭstaro rilate la eklezion.

Sonas tio preskaŭ nekredeble, se oni scias, ke lia unua deziro en junaĝo estis fariĝi pastro. La pastro, kiu de la predikejo volis instigi sian nacion. Kaj ke li faris la unuajn paŝojn – li ekstudis katolikan seminarion... nur unu jaron...

Antaŭ la tribunalo en Kutná Hora estis prezentita kiel kulpo lia forte kontraŭ-eklezia verko „Epistoloj de Kutná Hora“ (Kutnohorské epištoly).

Tiu ĉi spiteco respeguliĝas en liaj morde akraj epigramoj.

Oni emas aldoni eble nedecan diron: ĉu Havlíček estus kreinta tiel grandiozan poemajon, se li mem ne spertus la sorton „sur sia propra haŭto“??? Se li ne sidus en la „kaĉo“, kiu nomiĝas la ekzilo en Brikseno. Sed oni ankaŭ aldonu, ke li tiel laboris en la unuaj tempoj de sia restado, kiam li havis fortan intencon priverki historion de Rusio, certe ne „epigrammaniere“. Pri tiu ĉi serioza celo ni scias de liaj leteroj, en kiuj li petis siajn familianojn sendi al li la vortaron rusan-germanan, mapojn de Polujo, de Rusujo, ktp.

Oni devas scii, ke lia spitemo ne rilatis nur la administradon aŭstrio-registaran, sed ĉiujn despotismajn regadojn, la rusan unuagrade, ĉar li mem ĝin spertis, kiam li en siaj junaj jaroj laboris en Rusio kiel „gubernanto“ en iu profesora familio. Poste liaj leteroj montras skepticismon kaj malgajon – „... min, en mia nuna stato, maltrankviligas la necerta estonto, ke mi eĉ ne povas profunde pripensi, kiam tio finiĝos kaj kiamaniere... Mi ne havas emon por iu ajn laboro, nur mi iel vage ĉirkaŭiradas kaj enanime koleras...“

Ni klarigis kelkajn fontojn de lia poemado, je kiu, ni jam diris, li komence de sia estado en Brikseno havis varman emon. Certe la plej freŝa verko, kiun li kreis estante sur la loko, estas la „Elegioj de Tirolo“ (Tyrolské elegie). Kio okazis dum la malfacila veturado, estas konata al ĉiu ĉeĥa lernanto.

HISTORIE VALORA HEREDO DE K.H.B. en la nuna tempo

En la j. 1995 (aprilo) okazis lokigo de memortabulo de K.H.B. sur la domon en Brikseno, kie li vivis. Ĝin senvualis tiama prezidanto de l' parlamento de Ĉeĥa respubliko Milan Uhde. Kaj estas sur ĝi skribite:

„En ĉi tiu domo vivis ekde 1852 ĝis 1854 ĉeĥa patrioto, ĵurnalisto kaj satira poeto Karel Havlíček Borovský (1821 – 1856). De la aŭstria registaro forsendita el sia patrolando en ekzilon, li estis de la loĝantaro de Brikseno, ĝis sia reveno en Bohemion, amikece akceptita. Al rememoro de la ĉeĥa nacia heroo kaj granda civitano de Aŭstrio dediĉis la urbo Brikseno jenan memortabulon.

En aprilo 1995

Kompreneble, ke antaŭvespere okazis (en la hotelo Elefanto kaj en la urbo-domo) oficiala konferenco, kiun ĉeestis sufiĉe nombra delegitaro gvidata ĝuste de supre menciita M. Uhde. Alparolis ilin ankaŭ la reprezentantino de la sud-tirola regiono, kiu esprimiĝis, ke:

„Havlíček estis senekzemple kuraĝa, li ekpaŝis sur dornan vojon de nacia memstareco kaj fariĝis signifoplena personeco ne nur de l' historia, sed ankaŭ de la nuna Sud-Tirolo.“

Simile parolis alia reprezentanto, dirante ke – se ne tiam, do certe nuntempe – oni aprezas la klopodon de K.H.B. doni al ĉiuj nacioj aŭtonomion; ne en la senco de nacionalismo, sed en la senco valore nacia, kaj ke li tiel postulis la bazon por aŭtenta disvolvo de ĉiuj nacioj en unuiĝinta Eŭropo.

Margit Turková

Intervjuo - Ivan Acher – komponisto



Estis la 1-a de aprilo, tago, kiam multaj homoj ŝerce trompas siajn amikojn. Mi havis liberan tempon, do sencele mi senstreĉiĝadis ĉe la komputilo. Subite iu skribis: „La Nacia Teatro en Prago preparas novan premieron de opero en Esperanto.“ Do, ŝerco de la „unua de aprilo“, kaj sufiĉe sukcesa. Sed ĉi tiu bona ŝerco ne lasis min trankvila. Mi ne retenis min, kaj mi kontrolis la informojn en la retejo de la Nacia Teatro. Ĝi montriĝis la plej bona nekredebla informo, kiun mi ricevis ĝuste la 1-an de aprilo. Estis tie skribite – La monda premiero de opero en Esperanto! La 7-an de aprilo je la 19-a horo rekte sur la Nova Scenejo de la Nacia Teatro en Prago.

Mirinda kantado de la plej bonaj profesiuloj en nia lando. Belegaj kostumoj kaj muziko, kiujn vi spektas dum unu horo kaj duono. Malgraŭ tio, ke la enhavo de la opero estas sufiĉe malgaja, eĉ horora, la kreintoj sukcesis fari brilan kaj interesan verkon. Mi rimarkis, ke al la spektaklo venadis multegaj gejunuloj, sed tamen, sufiĉe malmultaj esperantistoj. Tio estas bedaŭrinda.

Du jarojn post la premiero, ni dum la Internacia Lernejo de Esperanto en la

kastelo Bartošovice havis la honoron bonvenigi la operan komponiston Ivan Acher kun lia edzino Jana Vébrová, kiu kantas liajn teatrajn kantojn en Esperanto, kaj la operajn kantistinojn Vanda Šípová kaj Tereza Marečková. Ni akiris geamikojn el la Nacia Teatro, kiuj malgraŭ tio, ke ili ne parolas Esperanton, uzas ĝin profesie.

La unua el niaj novaj amikoj estas la komponisto de la opero Ivan Acher, viro, sen kiu la opero certe ne ekestus. Krome mi pri sinjoro Acher devas diri, ke li estas posedanto de la premio „Ĉeĥa Leono 2019“, kiu estas la premio de la Ĉeĥa Filma Akademio (kiu ekvivalentas al Oskaro en Usono). Li ricevis ĝin pro sia muziko por la filmo „La metilernanto de horloĝisto“.

Verda Stacio: *Sinjoro Acher, ĉu vi koncize povas diri al ni, kie vi naskiĝis kaj kiel kaj kiam vi ekmuzikis?*

Ivan Acher: *Mi naskiĝis en la trilimejo inter Pollando, Germanio kaj Ĉeĥio. Naskiĝinta en kantista familio mi ekmuzikis jam kiel knabo. Ni kune kantis tri voĉojn dum la familiaj renkontiĝoj kaj festoj, dum Kristnasko, kiam kunvenis nia tuta familio el Slovakio kaj Ĉeĥio. De la frua aĝo la infanoj estis gvidataj kanti kune kun la parencoj, kaj kiam ili ne kantis bone, ili estis aĉe rigardataj. Do mi estis en la familio gvidata al la muziko ekde mia infanaĝo. En la mezlernejo ni kreis kapelon, ni ludis ion similan al arta rokenrolo, kaj poste mi opiniis, ke mi forlasos la muzikan vojon kaj plupaŝos laŭ la vojo de mia tiutempe ĉefa intereso – ke mi el la gimnazio iros*

al belarta altlernejo. Je mia granda ĝojo malgraŭ forta konkurenco mi sukcesis establiĝi en la dezajna altlernejo sen scii, ke mia destino celas muzikon.

En la unua jaro de la altlernejo en la atelieroj ni kreadis projektojn per komputiloj, tabulkomputiloj kaj grafika plumo, kie ni laboris helpe de modernaj teknologioj. Komprenoble, neniu estus povinta havi hejme tiom postuleman komputilon, ĉar ĝi kostis tiom, kiom familia domo aŭ du aŭtoj. Speciale ne komputilon tiom potenca, kiu kapablus flue registri sonon; tio hodiaŭ jam sonas absolute nekredible.

Mi eksciis tie, ke eblas registri sonon en komputilon, kaj tio kerne ŝanĝis mian vivon. Mi faris grafikaĵojn, kio ĝojigis min, kaj mi restadis en la cifereca ateliero ĝis profunda nokto. Ĉiuj iradis hejmen el la lernejo kaj mi ĉiam restadis tie longe post la noktigo. Sed tiam estis jam trankvilo por registri sonojn, la unuajn muzikajn specimenojn kaj por prilaboro de ili dumnokte. Gravis la funkcio, kiu ebligis registri unu trakon kaj apud ĝi la alian. Tio por mi estis miraklo, kiel malkovro de fajro en la prahistorio. Por mi estis ega bonŝanco povi alkanti la duan voĉon al la unua voĉo. Kaj mi estis kaptita pere de la muziko.

De tiam mi komencis fari ĉiuspecajn laborojn. Mi grimpis sur altaĵojn, riparis tegmentojn por ŝpari kaj poste aĉeti enhejman komputilon. Fine, ĉirkaŭ la jaro 1999, mi komencis komponi la unuajn verkojn sen sampleroj, kaj la sonojn mi registris mem. Mi registris realajn sonojn, mi provadis fari el industria sono sonon harmonian kaj plu uzadi ĝin.

Krome mi iom post iom ĉesis ludi en la

muzikgrupo kaj ekkomponis. Mi daŭre taglaboris sur altaĵoj, kaj poste mi iris al mia normala laboro, al grafika metiejo, kie mi laboris kiel grafikisto – mi devis enspezi la monon por povi finpagi tiun multekostan komputilon. Vespere, malfrunokte, mi laca komponis miajn muzikajn verkojn. Tiam mi komencis verki la ciklon *Orbis Pictus* de Komenio, mi enmuzikigis ĉiun ĉapitron. Tiel komenciĝis mia sistema laboro, kiun, dank’ al feliĉa koincido, oni rimarkis en Prago, kien mia kompaktdisko venis pro bizara hazardo, kaj la dirigento Petr Kofroň donis al mi la okazon komponi la unuan komponaĵon por la *Agon*-orkestro, kaj la reĝisoro Martin Tichý kaj la koregrafo Jan Kodet donis al mi la unuan ŝancon prepari por la teatro *Archa* en Prago la prezentaĵon, kiu nomiĝis *Danco Makabra*.

Verda Stacio: *Kion vi havas komunan kun Esperanto kaj kial vi verkas en ĉi tiu lingvo?*

Ivan Acher: Mi iam serĉis por ario, kiu devis soni belkantece, lingvon similan al la itala, sed samtempe ne identigeblan – do mi uzis Esperanton por tiu prezento. Estis tio por la Nacia Teatro en Brno kaj la unuan fojon mi konstatis dank’ al la traduko en Esperanton, ke la kantisto havas absolutan liberecon, ke tiu lingvo liberigas onin. Informcele ni ja povas legi la tradukon per la subtitola aparato. La libereco de tiu lingvo kaj ĝia grandega sonpitoresko, belega lingvostukturo, akcento kaj akĉento, tio mirindas. Ĉi tiu lingvo ne estis kreita por esti uzata en muziko. Tamen ĝia vortosono estas tiom universala, ke eĉ homo nur iom klera en aliaj lingvoj, pre-

cipe latinidaj, komprenos la signifon.

Esperanto komencis soni kaj sonigi muzikon kaj per poŝtupa laboro en diversaj ĝenroj ĝi montriĝis ideala por voĉa prezentado. Tiamaniere estiĝis opero *Sternenhoch*, kiu – mi esperas – Esperanton honoras. Nur iom pli poste en la Esperanto-lernejo en la kastelo de Bartošovice mi eksciis, ke tiu lingvo estis inventita por tute aliaj fakoj ol por nura universala interkompreniĝado, tiom malpli por kantado. Al mi restis lasi min ravi kaj malkovri belecon de Esperanto en muziko. Pro kreskanta influo de Esperanto, kiam la lingvo atingis sian kulminon, estis esperantigataj diversaj muzikaĵoj. En la 1950-aj jaroj la famaj arioj kaj operoj estis tradukataj al Esperanto.



Verda Stacio: *Sed mi devas diri, ke vi estas la unua en la mondo, kiu komponis profesion operon surbaze de libreto esperantlingva.*

Ivan Acher: Aha, tion mi ne sciis, do bonege. Mi ĉiam klopodis iri en muziko tra ĝis nun ne breĉitaj densaĵoj, malkovri kaj inventi. Mi ofte diris al mi, jen!, ĵus mi inventis vibran tremigilon de piankordoj – kaj kuris al mia profesoro, kiu dediĉis sin al eksperimenta muziko. Sed li trankviligis min, ke ion similan

jam inventis iu alia antaŭ mi, kaj tiel mia patentita entuziasmo preskaŭ ĉiam ricevis knokaŭton. Kelkajn miajn inventojn li tamen jam aprezis, ke mi enkonkukis ilin per tute nova maniero kiel la unua. Sed Esperanto estas klare pruvebla afero, do vian medalon mi akceptas entuziasme (granda rido).

Verda Stacio: *Ĉu estis por vi malfacile ekzerci operon en Esperanto kaj uzi tiun ĉi lingvon profesie?*

Ivan Acher: Ĉar ni havis kvalitan preparon kaj sufiĉe kvalitan tradukanton, s-ron Miroslav Malovec, ĉio iris glate. Sed tute facila ĝi ne estis, ĉar la reĝisoro havas tre malmultajn eblojn kontroli fluon de la teksto, ĉar Esperanton li vere ne komprenas. Sed kiam ni ambaŭ havas antaŭ ni la partituron, ni povas ĝin kontroli kaj kiam io ne estas en ordo, iu tion rimarkas kaj anoncas. Ni korektis nin reciproke. Sed ekzemple Luděk Vele (trifoja laŭreato de la ĉeĥa teatra premio THALIA) havis problemojn. Li estas viro en pli alta aĝo, la teksto ne eniris lian kapon facile, kion mi komprenas. Ĉiuj ceteraj aprezis, ke ili sentas sin libere, ke kantado en Esperanto ilin ravas.

Verda Stacio: *Kiuj estis la sukcesoj de la opero?*

Ivan Acher: Unue la opero fariĝis la evento de la jaro en la Ĉeĥa Respubliko, laŭ la ĵurnalo *Divadelní noviny* (Teatra gazeto). Plue la spektaklo de la jaro. Poste ĝi ricevis la premion de teatraj kritikistoj de la Ĉeĥa Respubliko. Kutime oni venkas per 7 voĉoj kaj la opero *Sternenhoch* venkis per 28 voĉoj. Do tio es-

tas grandega sukceso, kaj mi ĝojas, ke al kontento de la publiko, kiu estas tre miksita (de punk-rokuloj ĝis operaj kantistinoj en vesperaj roboj), respondas ankaŭ unuigo de miksitaj karakteroj de la kritikista komunumo. Eĉ la libreto en Esperanto estis nomumita al premio de la kritikistoj.

Verda Stacio: *Kiel kontentaj vi estis kun kvanto de vizitantoj? Ni scias, ke esperantistoj estis tre malmultaj por plenigi la salonon de Nacia Teatro, plie la opero estas ludata jam la kvaran sezonon kaj realiĝis pli ol 20 spektakloj. Ĉu estas nekutime eĉ por tiel glora scenejo, ke oni ludas operon tiom longe?*

Ivan Acher: Kiam ni kalkulas, ke ĝi estas tute nova opero kaj tiaj estas ludataj dufoje aŭ trifoje, tiukaze ĝi estas nekutima. Por la unuaj du vesperoj ordinare venas abonantoj, kiuj plenigas salonon de Nova Scenejo de Nacia Teatro, kiu havas kapaciton de ĉirkaŭ 400 seĝoj. 400 homoj estas relative multe kaj ni atendis, ke ni ludos nur por la meza bloko kun 250 lokoj. La premiero estis disvendita kaj jam post premiero disvastiĝis inter la publiko, ke valoras vidi la operon. Kaj la entuziasmo de la homoj faris al ni reklamon, eĉ solan reklamon, ĉar la teatro mem reklamon ne faris kaj ne helpis, ĉar oni kredis, ke opero baldaŭ estingiĝos, kiel aliaj novaj operoj antaŭe. Sed danke al klaĉmetoda disfamigo ni transvivis kaj plenigis ne nur la unuajn du postpremierojn, kiuj estis ankaŭ disvenditaj, sed ni plenigas ĉiun novan spektaklon. Nur escepte ni ne plenigis la salonon, sed tio estis neplanitaj datoj, kiam la opero anstataŭis alian spektaklon, sed eĉ tiam ni havis almenaŭ 350 spektantojn. Vere ĝi estas

ĝoja sonĝo. Nacia Teatro ĉiam kalkulas kun la opero, eĉ post 4 sezonoj ni havas 10 novajn datojn, kio estas granda ĝojo.

Verda Stacio: *Kion vi povas diri pri via grandega sukceso de antaŭ unu jaro? Temas pri la premio agnoskata de la Ĉeĥa Filma Akademio.*

Ivan Acher: Vi celas la Ĉeĥan Leonon por la muziko uzita en filmo. Do nun ni atendas nur Oskaron, mi devas batali, nu. *(granda rido)*

Verda Stacio: *Kion vi pleje ŝatas krei, kia estas via verkaro?*

Ivan Acher: Mi plej ŝatas krei tute ĉion, kion mi komponas. Kiam mi jam akceptas ion, mi tute plene engaĝiĝas en tion. Tiu mia laboro konsistas plejparte el muziko por filmoj kaj teatraj prezentaĵoj. Granda parto koncernas la dancprezentojn kun la mondfama koregrafino Lenka Vagnerová kaj kun Jan Kodet. Ni kunlaboras jam dum dek jaroj kaj estis neniu spektaklo, kiu ne estus gajninta iun premion. Jen mirinda kunlaboro.

Mi devas mencii ankaŭ belegan kunlaboron kun la radio, kiu disvastiĝis dum la pandemio. Nun ĝi estas la sola agado, kie eblas roli preskaŭ apartigite. Plejparte ni povas labori hejme, do ne ekzistas iu ajn risko. Mi preparas unu radian teatraĵon ĉiun duan monaton kaj tio belegas. Mi laboris por la ĵaza grupo *NUO*, serioza-moderna grupo de la *AGON*-orkestro.

Kun la knabinoj el la operejo kaj kun la teatraj aktorinoj (kaj nove ankaŭ kun la baletistino de la Nacia Teatro Kristina Kornová) ni veturas al koncertoj (duone

esperantlingvaj), ĉar ili jam sufiĉe kolektiĝis dum la multaj jaroj. Sufiĉas ili jam por la tutvespera programo kaj ĝi havas sukceson ne nur ĉe la spektantaro, sed ankaŭ ĉe la prezentistinoj. Ĉi tio koncernas ĉefe la kantistinojn Tereza Marečková (talento de la jaro 2018 en la Ĉeĥa Respubliko), Jana Vebrová (la unua premio por la prezentado dum la teatra festivalo en Edinburgo) kaj Vanda Šípová (nomumita por la premio de teatraj kritikistoj de la Ĉeĥa Respubliko kiel kantistino). Kaj eĉ por esperantistoj ni jam kantis dum la Esperanto-Lernejo en la kastelo Bartošovice kaj en la Muzeo de Esperanto en Svitavy. Mi diras ĉi tion nur, ĉar ni jam pretas fari koncertojn ankaŭ por esperantistoj ekster Ĉeĥio. Kompreneble, la tuta opero estus tro multekosta por Esperanto-aranĝoj, tial ni havas koncertojn de kantistinoj el la opero *Sternenhoch*, kiuj kantas en Esperanto.

Kun la opero ni estis invititaj al la Moravia-Silezia Nacia Teatro en Ostrava, ni malfermis la internacian teatran festivalon en Nitra, Slovakio. Antaŭ nelonge ni estis invititaj roli kun opero ĉe la Reĝa Operdomo en Madrido, sed la prezentado ne okazis pro la pandemio.

Kiam mi la unuan fojon estis nomumita por la premio de la filma akademio Ĉeĥa Leono por la muziko en la filmo *Rubo, Urbo, Morto*, proksimume antaŭ ses jaroj, tie estis ankaŭ unu el la unuaj kantoj kantitaj en Esperanto en la filmo kun la titolo En la nokto...

La opero *Sternenhoch* estis prezentita ankaŭ en la elsendflua platformo Opera-vision, kie estas prezentataj sukcesaj operoj el la tuta mondo, kaj ĝuste *Sternenhoch* reprezentis nian Nacian Teatron.

Verda Stacio: *Kiuj estas viaj venontaj planoj pri Esperanto?*

Ivan Acher: Post ĉi tiu neatendita aventuro kun opero mi kompreneble tre fidas je Esperanto kiel legitima lingvo, kiu liberigas kaj vekas emociojn. Mi plu laboros per ĝi. Tio estas certa afero. Ĝuste post la eksplodo de *Sternenhoch* mi konatiĝis kun multaj interesaj homoj el diversaj specialoj, kiujn ligas ĝuste la lingvo Esperanto. Kaj tial mi tre ĝojas, ke mi povas kontribui al tio, ke tiu lingvo ne malaperu, ke ĝi havu kion proponi al la homoj, ĉar ĝia malapero estus domaĝa ankaŭ por la muziko. Mi konsideras ĝin esti la plej varia lingvo por la voĉa kreado.

Verda Stacio: *Dankon nome de mi mem kaj ankaŭ nome de ĉiuj, kiuj ŝatas operon, kaj eĉ nome de tiuj, kiuj ĝin ne ŝatas, sed kun plezuro legas ion interesan pri Esperanto. Mi esperas, ke post pandemio, kiu kredeble ne restos inter ni por eterne, ni renkontos kun vi ofte. Mi povas malkaŝi, ke planitan ĉi-jaran konferencon de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Bartošovice malfermos koncerto el opero Sternenhoch. Per tio mi volas inviti vin oficiale, s-ro Acher, ke vi prezentu vin al ni ne nur kiel aŭtoro de arioj el opero Sternenhoch, sed ankaŭ de aliaj komponaĵoj ligitaj kun Esperanto.*

Intervjuis:

Pavol Kaščák - Verda Stacio - Prago

La intervjuo estis publikigita (bone redaktita, sed mallongigita) en oktobra numero de revuo Esperanto 2021. Ni prezentas kompletan tekston.

Granda Ĉeĥa-Esperanta Vortaro

aperos en 2022

Ĝuste nun okazas la lastaj laboroj pri la nova Granda Ĉeĥa-Esperanta Vortaro.

En 1983 Zdeněk Hršel telefonis al Ŝtata Pedagogia Eldonejo kaj proponis pligrandigi la vortaron de Rudolf Hromada kaj tiel omaĝi la centjariĝon de Esperanto en 1987. La eldonejo konsentis.

Hršel kolektis grupon da homoj, kiuj helpis al li skribi ĉiun vorton de la vortaro sur slipon kaj poste aldonadi slipojn kun novaj vortoj. Ĉefaj kunlaborantoj estis Karel Kraft kaj Miroslav Malovec. Poste necesis ĉion skribi sur paperfoliojn de formato A4. La eldonejo redonis la tajpaĵon kun kritikaj rimarkigoj por reverki la tekston. Ni ne sukcesis ĝis 1987, nek ĝis 1990, poste la eldonejo rifuzis la vortaron eldoni, ĉar havante liberecon ni povas ĝin eldoni mem.

Mi enkomputiligis la tutan vortaron kaj komencis prepari la finan redakton kun Karel Kraft, ĉar Zdeněk Hršel ne kapablis labori per komputilo. Kiam ne eblis trovi novan eldoniston, Petr Chrdle decidis eldoni ĝin en sia agentejo KAVA-PECH, fondita en 1992, sed unue nur parton Esperan-

tan-Ĉeĥan en 1995 kaj en 1998 Ĉeĥan-Esperantan.


En 2014 Petr Chrdle proponis al mi prepari novan eldonon de Esperanta-Ĉeĥa parto. Mi konsentis kun kondiĉo, ke mi povos enmeti preskaŭ ĉiujn vortojn el PIV. La dujaran laboron kontrolis Karel Votoček, Jindřich Košťálek, hungaro József Horváth kaj precipe Zdeněk Pluhař,

kies rimarkoj estis plej gravaj. La aranĝon en kolumnoj prilaboris Jaroslava Malá. La vortaro aperis en 2017.

Poste mi promesis fari la samon kun la alia parto de la vortaro. Unue mi rekonstruis en mia komputilo la eldonon de 1998. Dua paŝo estis korektoj laŭ Zdeněk Hršel, kiu donis al mi en 2010 sian ekzempleron de la vortaro

plena de liaj krajone enskribitaj rimarkigoj kaj enmeto de novaj vortoj. Karel Votoček kaptis precipe mistajpojn, Zdeněk Pluhař korektas erarojn de esprimoj teĥnikaj, zoologiaj, botanikaj kaj medicinaj. La aranĝon en kolumnoj denove faras Jaroslava Malá, la titolpaĝon Luděk Neužil. La vortaron aperigos denove la eldonejo KAVA-PECH.

Miroslav Malovec



Informace vedoucího delegáta UEA

*Petr Chrdle, vedoucí delegát UEA pro ČR, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice
chrdle@kava-pech.cz, tel.: 736 645 455*

Přímí členové UEA a zájemci o členství.

Výše členského příspěvku pro rok 2022:

Kategorio MB (baza, kun reta gazeto Esperanto)	EUR 27.- (710 Kč)
Kategorio MA (kun papera Revuo Esperanto)	EUR 57.- (1 500 Kč)
Kotizo por Societo Zamenhof (Kategorio SZ, mecenato de UEA), la kotizon oni pagu aldone al sia kategorio de membreco	EUR 114.- (3 000 Kč)
Patrono de TEJO (Kategorio PT, mecenato de TEJO) ne inkluzivas membrecon. PT ricevas la junularan revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO)	EUR 44.- (1 160 Kč)

Přímí členové UEA kat. MB a MA do 29 let včetně dostávají navíc oficiální orgán TEJO „Kontakto“.

Výše v Kč uvedená v závorce platí jen při platbě do 22. 12. 2021. O možnosti platby v Kč včetně výpočtu aktuální výše příspěvku viz níže.

Ti z vás, kteří neobnovili členství v r. 2021 a nechcete mít své členství přerušeno, vezte, že je možno si ho stále uhradit, např. společně s rokem 2022. Proto je potřeba uhradit alespoň kategorii MB.

Těm z vás, kteří jsou **delegáty**, ev. odbornými delegáty UEA, děkuji za tuto službu, která jistě není nijak náročná, ale jste článkem velice důležité sítě esperantistů ochotných nezištně pomoci jiným esperantistům. Jen připomínám, že není povinností delegáta ani ubytovávat esperantisty (k tomu slouží síť Pasporta servo), ani přijmout jakoukoliv prosbu zahraničního esperantisty, která by vyžadovala vaše finanční výdaje nebo příliš vašeho času. V tom případě máte právo takovou žádost odmítnout, eventuálně žadatele upozornit, že vyhovíte, pokud vám nahradí výdaje s tím spojené, které dohromady činí „xy“ EUR. Ale vždy je slušné odpovědět. Po zrušení ročenky Jarlibro UEA zatím nerozhodlo o další formě využití delegátů. Stávající zůstávají v platnosti, ale noví se provizorně nepřibírají. Jakmile budou známa nová pravidla, samozřejmě vás budu informovat.

Informace o UK 2022 v Montrealu (Kanada) 6. až 13. 8. 2022

Zájemci, vyžádejte si přihlášku a *unuan bultenon*, pošlu jakmile je obdržím z UEA, nebo si vše můžete stáhnout už teď z <http://uea.org/kongresoj>.

Kongresový poplatek je možno platit na účet ČES do 22.12.2021, aby byla jistota, že to stačím nahlásit do UEA do 31.12.2021 (konec první periody, po níž se poplatky citelně zvyšují: do 31. 3. na 180 – 225 – 90 – 130 EUR). Poplatky do 22. 12. jsou pro nás (Kat. B):

1. Přímý člen UEA (kategorie MB i MA) 145 EUR (3 815 Kč)
2. Ne přímý člen UEA: 180 EUR (4 734 Kč)
3. Člen výboru UEA, mládežník*, invalida**, pokud je přímý člen UEA: 70 EUR (1 841 Kč)
4. Společník***, mládežník, invalida, ne přímý člen UEA 105 EUR (2 762 Kč)

* Mládežník: Narozený mezi 1.1.1992 a 31.12. 2001 (stejně pro mládežnice)

** Invalida: Ten, jehož účast nutně předpokládá doprovod (např. nevidomý)

*** Společník: kdo bydlí na stejné adrese s přihlášeným ad 1, ev. ad 2.

Bezplatně se přihlašují narození po 31. 12. 2001 a nezbytný doprovod přihlášeného invalidy.

Jestliže se UK 2022 nebude moci uskutečnit, kongresový poplatek (jinak nevratný) bude vrácen po odečtení 15 € za administrativní náklady.

Možnost platby ve prospěch UEA v Kč (jak členství, tak i platby pro UK) prostřednictvím ČES je služba členům. Proto ji ČES poskytuje pouze svým členům.

Vzhledem k rizikům pohybu kurzu CZK/EUR jsou uvedené kongresové poplatky v Kč, které nevyžadují, abyste se zabývali přepočtem, platné jen do 22.12.2021. Po tomto datu použijte pro přepočet kurzu následující postup:

Aktuální kurz, v kterém budete platit na účet svazu, si spočtete tak, že sumu v EUR vynásobíte aktuálním kurzem (ČSOB deviza prodej + 0,1 Kč) podle kurzovního lístku na odkazu

<http://www.csob.cz/cz/Csob/Kurzovni-listky/Stranky/kurzovni-listek.aspx>.

V případě nejasnosti kontaktujte mne nebo pokladníka ČES Vratislava Hirše a my Vám sdělíme aktuální kurz, a tedy cenu v Kč.

Svazu platíte poštovní poukázkou A nebo převodem na účet **2800186228/2010, variabilní symbol** má celkem 10 míst – prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na obálce při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (**06941 pro přímé členství v UEA, 06944 pro poplatek UK**).

Pokud platíte v jedné sumě i jiné platby svazu, informujte o tom (s rozpisem co, ev. za koho současně platíte) na adresu Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, e-mailem vhirsx@email.cz.

Esperanto en amaskomunikiloj

■ La 21-an de oktobro 2021 Ĉeĥa Televido en programo *Bedekr* prezentis la polan urbon Bialistoko kaj kelkajn minutojn ĝi dediĉis al Zamenhof, lia muzeo kaj kafejo Esperanto.

■ En televida programo *Na lovu* (En ĉaso) de televido Nova Plus konkursis esperantistino Milada Zemanová, kaj kvankam ŝi ne venkis, montris multajn sciojn pri diversaj kulturaj aferoj.

■ La 24-an de novembro 2021 Ĉeĥa Televido en la ĉefa informa programo *Události* (Eventoj) rememoris transportojn de judoj el Prago al la koncentrejo Terezín kaj dediĉis kelkajn minutojn ankaŭ al Petr Ginz.

■ En la revuo *Esperanto 10/2021* aperis artikolo, en kiu Pavol Kaščák intervjuis Ivanon Acher pri lia artista laboro kaj opero *Sternenhoch*.

■ En *Juna Amiko 3/2021* por infanoj kaj komencantoj Luiza Carol recenzis libron **Lorenaj fabeloj** de Angelika Merkelbach-Pinck esperantigitan de Benoit Philippe kaj ilustrita de Pavel Rak, kiun eldonis eldonejo KAVA-PECH.

■ Dusemajna ĉeĥlingva fervojista gazeto *Obzor* la 25-an de oktobro 2021 publikigis artikolon *Seminář železničních esperantistů* pri seminario de fervojistoj-esperantistoj en Pardubice la 12-an de oktobro 2021.



KoKoKo

Klare Kaj Konkize

estas nova asocia informilo, daŭrigo de RET-informoj, kiu informos konkize, sed rapide pri aktualaĵoj per ret-mesaĝoj.

komitato@esperanto.cz

TEJO progresis ĉe UN

Post longa klopodado TEJO (= esp. junularo) ricevis **Specialan Konsultan Statuson** ĉe *Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj* (EKOSOK) pere de kiuj ne-registaraj organizoj (NRO-j) estas reprezentitaj ĉe UN-instancoj.

Laŭ Esperigaj Komunikoj de ILEI

Reta kurso en Ĉinio

Fine de septembro 2021 okazis malfermo de reta Esperanto-kurso por 280 aliĝintoj el 23 provincoj tra Ĉinio kaj ankaŭ kelkaj el alilando. La kurso daŭros unu semestron.

Esperanto en spaco

La aktoro William Shatner, konata kiel kapitano de stelŝipo en televida serio *Star Trek*, partoprenis ĉi-jare veran kosman vojaĝon kiel pasaĝero. Por ni li estas interesa pro tio, ke en filmo *Incubus* li parolis Esperante. Sed vera kosmonaŭto-esperantisto estis hungaro Bertalan Farkas.

56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

okazos la 9/17-an de julio 2022 en litovia KLAIPÉDA, 300 km de Vilnius.

Detalojn serĉu ĉe

<https://sezonoj.ru/bet/>

OMAĜE AL 100-a NASKIĜJUBILEO DE ĈESTMÍR VIDMAN

1921 – 2013

La memorejo de la urbo Rožmitál pod Třemšínem **Podbrdské muzeum** malfermis la ekspozicion pri la urba eminentulo Ĉestmír Vidman (je la 27-a de oktobro ĝis la 30-a de novembro 2021), ĉar kaj lia naskiĝo kaj la forpaso datiĝas en la sama monato.



En la sama tago (17 h.) okazis prezento de la dramo "Johana z Rožmitálu – královna česká" pere de Stanislava Hořková, kiu laste kunlaboris kun Ĉ. V. por elkrei la historian dramon, kiu koncernas nian landon, la burgon kaj la urbon Rožmitál precipe.

Tre ĝojiga estas konstato, ke la organizantoj respektis kaj ofte menciis la esperantistecon de Ĉ.V. kaj lian agadon ĉi-teme.

Margit Turková

„Handikapita ekde naskiĝo mi ekkonis la forton de poezia vorto, kiu helpis min venki ĉiujn obstaklojn kaj malfacilaĵojn. Poemo estiĝas el sereno aŭ doloro. En ĉiu verso estas peco de nia memo.

La vivo estas granda respondeco. Mi sentas sinĝenon, kiam mi bezonas esprimi grandajn vivtemojn. Mi sentas neperfektecon de mia esprimado. Malgraŭ tio mi provas denove trovi novajn nuancojn en tonoj kaj koloroj de vortoj, similante tiel al fratoj muzikistoj kaj pentristoj.

Ĉestmír Vidman

Versojn li verkis jam en la studentaj jaroj. Li lernis de ĉeĥaj poetoj kaj ne nur legis iliajn verkojn, sed kun multaj li ligis kontaktojn kaj fariĝis ilia kolego.

Ĉestmír Vidman dum la tuta vivo laboris en eksterlanda komerco. Lia diligento kaj talento por lingvoj antaŭdestinis lin fariĝi eksportisto al multaj landoj de la mondo, komence de precizaj instrumentoj kaj mezuriloj, poste de kontrolaj aŭtomatoj por lagro-insdustrio. Konatiĝo kun fremdaj regionoj inspiris lin por verkado de pluaj poemoj. Plej ofte li estis en Sovetio (17x), Egiptio (14x) kaj Japanio (10x).

La spertojn kaj impresojn de vojaĝoj la poeto publikigis ankaŭ en formo de riportoj aŭ rakontadoj. Jam en **1965** elsendis **Ĉeĥoslovaka radio** serion pri niaj muzikistoj gastantaj en la Kaira Opero en Egiptio, iom poste radio-programo **Domino** en Brno plurfoje prezentis travivaĵojn de Vidman en Japanio. En la jaroj 1998 – 1999 elsendadis stacio **Regina** liajn travivaĵojn el eksterlando regule.

Ĉestmír Vidman komencis publikigi nur en la 1970-aj jaroj kiel 51-jarulo. Lia unua eldonita poemkolekto estis en 1972 Maro (50 ekzempleroj). En la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj eldonadis liajn librojn eldonejo Josef Cipra en Kladno, ĉefa ilustristo estis Vladimír Koukl. Pluraj libroj aperis dulingve en spegula ĉeĥa-esperanta versio*. Kun publikigado grave helpis lin lia esperantista amikino.

*esperantigis J. Krolupper

Legajoj amuzaj kaj klerigaj

Zamenhova afero pluvivas

Esperanton lernas homoj scivolemaj, kun larĝa mens-horizonto. Por reteni komencantojn en Esperanto-komunumo necesas ilin interesigi kaj konstante klerigi. Esperanto estu nemalhavebla kanalo por konatiĝi kun valorajoj de monda kulturo, por ekscii – en oportuna formo – novaĵojn de scienco, gravajn informojn plej diversspecajn, kaj ankaŭ – por simple amuziĝi. Tion bone komprenis jam Zamenhof mem. En “Fundamenta Krestomatio” (1903) troviĝas ne nur beletraĵoj originalaj kaj tradukitaj, fabeloj kaj legendoj de diversaj popoloj, filozofiaĵoj, sed ankaŭ facilaj sciencopopularaj artikoloj, kaj – simplaj anekdotoj. La Fundamenta Krestomatio estis multfoje reeldonita kaj restas valora – tamen, nun tiu valoro estas ĉefe historia.

Dum cent jaroj okazis multegaj eventoj, la monda kulturo grave pliriĉiĝis, sciencoj kolose progresis. Bezonatas novaj krestomatiaĵoj, kaj certe ne eblas enmeti ĉion indan en unu volumon.



Pri tio modele zorgas ĉeĥa E-aktivulino Jindřiška Drahotová. En 2003-2016 ŝi kompilis kaj eldonis 12 kajerojn de “Legolibretoj”. Post 2016

la serion daŭrigas “Legajoj”: ĝis nun aperis naŭ 100-paĝaj volumetoj.

S-ino Drahotová trovas interesajn materialojn en diversaj E-revuoj, tradukas elektitajn artikolojn el ĉeĥa gazetaro, multe verkas mem; en preskaŭ ĉiu volumeto troveblas ankaŭ verkoj (fragmente, se la verko longas) de niaj elstaraj literaturistoj: Kálmán Kalocsay, Tibor Sekelj, Sten Johansson, István Nemere k.a. Ĉio legeblas facile, la pecoj malofte superas unu paĝon. La enhavo tre varias. Ekzemple, en la 9-a volumo de “Legajoj” oni trovas “Dek konsilojn por sukcesi kaj atingi viajn celojn”; prezenton de mezepoka filozofo R. Bacon kun citaĵoj el liaj verkoj; konsilojn kiel eviti demencon kaj kiel trakti demenculojn; mallongajn rakontojn – realajn kaj elpensitajn por ŝerci; priskribojn de vidindaĵoj diverslandaj... kaj multon alian.



Estas vere tre plaĉaj kaj utilaj libretoj. Sola bedaŭrindaĵo estas ĝenaj preseraroj – iam eĉ en la nomoj de aŭtoroj. Ja, ĝuste en libroj por komencantoj oni devas esti aparte atenta kaj zorgema pri ĝusta ortografio.

Valentin Melnikov, Rusio

Foriris slovaka esperantisto inĝeniero Johano Vajs

(21. 6. 1953 - 15. 9. 2021)



Antaŭ nelonge slovaka kaj ĉeĥa esperantistaro suferis gravan perdon. Sincera, justa kaj honesta amiko Johano Vajs foriris rapide kaj sen adiaŭo. Ni renkontiĝis kiel studentoj de la Agrikultura Universitato en Nitra. Eĉ tiam li estis rekonata de studentoj kaj instruistoj kiel principa, respondeca kaj laborema studento. Sukcese li aplikis siajn organizajn kapablojn en la junulara movado, li organizis sportajn, kulturajn kaj aliajn eventojn ĉe 3 fakultatoj de la universitato. Post studado li revenis en naskiĝ-regionon Liptov. Li komencis labori en Unuiĝintaj kamparanaj kooperativoj en Hybe, poste en Liptovský Ondrej, laborante kiel zooteknikisto, ĉefinĝeniero kaj baldaŭ li iĝis direktoro. Tiama situacio en nia agrikulturo estis malfacila. Okazis intergeneracia interŝanĝo kaj necesis transformi labormanierojn, altigi produktivecon kaj rikolton de plantoj. Gravaj taskoj demandis grandan klopodon de lia parto. Poste li laboris je regionaj kaj ŝtataj niveloj kiel sekretario de Asocioj de agrikulturaj kooperativoj, direktoro de Regiona kaj Slovaka agrikultura kaj nutraĵa ĉambro, direktoro de Regiona fako de Ministerio por agrikulturo. Sian

fakan laboron li finis kiel ŝtata oficisto en Ministerio de termastrumado kaj evoluo de regionoj en Bratislavo. Dufoje (2003, 2016) li ricevis medalon de slovaka ministerio de termastrumado kaj en 2012 memorplakedon. En 2016 li ricevis raran honorigon de mongola ministrino de nutraĵo kaj agrikulturo. Inĝeniero Johano Vajs dediĉis al agrikultura progreso en Slovakio siajn kapablojn, scipovojn kaj libertempojn.



*Sur montopinto Gerlachovský štít,
septembro 2020*

Esperanton li rimarkis kiel knabeto en la revuo Slniečko. Reale li esperantistiĝis en 1980, lernante per korespondado, poste instruita pere de M. Zvara, A. Zachariáš, M. Rybín, E. V. Tvarožek. En 1983 li partoprenis internacian lernejon por funkciuloj en Varna. Johano dediĉis sin al ĉio kun plena engaĝiĝo. En E-movado li laboris en kelkaj postenoj: vicprezidanto de LEK, prezidanto de mezslovaka komitato de SEA, sekretario de SEA. Post malapero de SEA, en la plej grava periodo por slovaka movado,

li kunfondis kaj prezidis Mezslovakian Esperanto-Ligon (MEL). En 1997 li fariĝis kunfondinto de SKEF, kiun li prezidis en 1998-2001, poste li agis kiel sekretario de LEK. Li estis unu el tiuj homoj, kiuj pensis pri konservado de tradicio kaj historio. Li iniciatis kreon de ZEO-j en Slovakio: tombon por geedzoj Tvarožek en Martin, memortabulojn al A. Škarvan (Hybe), M. Rybín (P. Ľupča).



101-a UK en Nitro en la jaro 2016

Krome, li estis dotita per literatura talento, kion li montris kiel E-verkisto, tradukisto, ĵurnalisto kun tre ampleksa kaj eminenta verkaro. Li skribis dokumentojn (Esperanto en Liptovo en 1980-1985, Gvidlibro, Memorlibro, Esperantisto Slovaka, slovaka bibliografio kaj historio, Subtatrano). En la biografia verkaro li skribis pri esperantistoj E.V. Tvarožek kaj Miloslav Rybín. Li provis kapti kiel eble plej multe el la historio de E-movado en Slovakio, dediĉante sin al tiu ĉi laboro kun amo kaj pleneco. Dank' al liaj klopodoj estiĝis du gravaj verkoj: *Cent gravaj personoj de Esperantomovado en Slovakio* kaj *Kiu estas kiu*. Tiuj verkoj montris per la vivo de esperantistoj historion de E-movado dum 100 jaroj en Slovakio. Okaze de la 101-a Universala Kongreso en Slovakio en 2016 li preparis faktografian verkon pri

Slovakio – *Slovakaj plejoj*. Kiel vicprezidanto de LKK li dediĉis grandan klopodon al organizado kaj sukcesa kurado de la 101-a UK en 2016 en Nitro. Dum solena malfermo li estis honorigita por dumviva laboro per diplomo de UEA. Li ĉeestis dek du Universalajn Kongresojn kaj partoprenis multajn slovakajn, ĉeĥajn kaj internaciajn okazaĵojn, kie ofte li prelegis. Post disiĝo de Ĉeĥoslovakio li fariĝis integra parto de la slovakaj kaj ĉeĥaj E-movado. Liaj verkoj pri UK en Islando (Ultima Thule) kaj Vietnamio (Kongresa taglibro) estas fontoj de informoj pri kongresoj kaj landoj.

Johano ŝatis poezion, kvankam li ne verkis ĝin mem. Tradukante verkon de poetino Marketa Dobrovičová: *La knabino kun vizaĝo de la luno* (S-E) kaj de Tibor Sekelj: *Temuĝin, la filo de la stepo* (E-S) li esprimis sian poezian talenton. Plurajn jarojn li redaktis Esperantisto-n Slovaka-n kaj klubinformilon Subtatrano, kunlaboris kaj verkis pro Kooperativa Stelo. Johano korespondis kun multaj esperantistoj eksterlande kaj li kontribuis al revuoj *La Ondo de Esperanto* kaj *Turka stelo*. Liaj artikoloj ĝojigis ankaŭ legantojn de speleologiaj kaj regionaj periodaĵoj. Johano estis fervora leganto de historia kaj vojaĝa literaturoj slovake kaj Esperante. Regule li reprezentadis Slovakion en la legokonkurso Esperanto-Sumoo, organizita far japano Hori Jasuo.

Johano naskiĝis kiel vera montarinano sub Tatroj. Sian amon por grotoj li heredis de sia kuraĝa patrino. Montaroj, grotoj kaj vojaĝado fariĝis parto de lia interesa vivo. Ekde 1983 li organizis renkontiĝojn de vojaĝantoj sub la nomo Poludnica en naskiĝvilaĝo Liptovský Ján.

Krom tio li regule skribis pri ĉiu supreniro enkadre de la programo de vojaĝantoj en retpaĝo Poludnica. Iom post iom li preparadis multajn renkontiĝojn de vojaĝantoj kaj esperantistoj: Danuba vojo, Surspure de Habanoj, Mediteraneo, Slovakaj montaroj, La plej altaj montoj de EU, Rodopi 89, Monto Blanka 91, Ĝibraltaro 92, Mongolio 94, Madagaskaro 2016, Tibeto kaj Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo 2017. Entute li vizitis pli ol 70 landojn. Tage dum vojaĝo li skribis detalajn notojn kaj publikigis siajn vojaĝspertojn en la retejo de LEK kaj en Esperantisto Slovaka. Li revis pri aliaj vojaĝoj, sed ili estis interrompitaj per tutmonda sanpandemio. Li ne finis ĉion, pri kio li sonĝis kaj kion li volis lasi kiel sian mesaĝon. La vivo de samideano Johano Vajs estis multflanka, interesa kaj inspira por aliaj. Eble li donace ricevis en lulilo energion por plenumi nekonatan mision. Ĉiuokaze, danke al personoj kiel li, Esperanto vivas jam pli ol cent jarojn. Johano naskiĝis sur la stelo de amikeco, altruismo kaj socia justeco. Tiujn kvalitojn li heredis de siaj Habanaj prapatroj. La tutan vivon li klopodis disvastigi ĉi tiujn valorojn en la socio. Ni esperos, ke li revenis al tiu stelo.

Mária Pilková

■ La 9-an de novembro 2021 mortis **Petr Knížák** (65 j.) el Mariánské Lázně, dumviva membro de la asocio.



■ La 28-an de oktobro 2021 forpasis en Šumperk **Karel Vala** (80 j.), estrarano de Internacia Naturista Organizo Esperantista.

Ankoraŭ en Bartošovice ni renkontis lin en bona humoro, ne suspektante lian baldaŭan forpason.



Karel Vala tute maldekstre en blua ĉemizo



Interparolante kun K. Votoček sur teraso



Kluba rememoro pri Karel

Karel estis unu el ni. Kiam li transloĝiĝis el Ostrava al Šumperk, li tuj eklaboris en nia klubo. Li amis vojaĝadon, fotadon, teatron kaj humuron. Ni rigardas lian malplenan seĝon kaj ne povas kredi, ke li neniam plu venos.

JUBILEANTOJ DE OKTOBRO, NOVEMBRO KAJ DECEMBRO 2021

Pavel Acher, Moravské Budějovice
Stanislav Čermák, Železný Brod
Antonína Černá, Hlinsko
Hana Česneková, Červený Kostelec
Marie Čumová, Svitavy
MUDr. Tomáš Folta, Ostrava-Stará Bělá
Markéta Hillebrandová, Jablonec
n/Nisou
Vlasta Hillebrandová, Jablonec n/Nisou
Eva Chaloupková, Praha
Leonarda Chaloupková, Světlice
Jiří Jelínek, Jilemnice
Ludvík Klíma, Žichovice
Ing. Jindřich Košťálek, Jince
Petr Lojek, Ostrava
Nažděžda Luňáčková, Jablonec n/Nisou
Milada Zemanová, Pacov

Al la jubileantoj ni deziras firman sanon,
kontenton kaj ĝojon en iliaj pluaj jaroj!

Marie Čumová – 75

Inter la jubileantoj estas
ankaŭ honora membrino de
ĈEA, Marie Čumová el
Svitavy, kiu jam pli ol
jardekon prilaboras la
asocian bibliotekon kaj
libroservon. Ŝi devis komputile registri
ĉiujn librojn kaj gazetojn (pli ol 20 mil
erojn!) kaj trovi por ili lokon en la
deponejo, kiu jam estas plenŝtopita. En
la deponejo plue troviĝas arkivo de
manuskriptoj kaj korespondaĵoj de
gravaj esperantistoj, kiuj ankaŭ bezonas
prilaboron.



EK Prostějov

La 30-an de decembro 2021 en nia
klubejo (Husovo nám. 91) en Prostějov
efektiviĝos Silvestra renkontiĝo kaj
adiaŭo de la jaro 2021. Ĉe eniro necesas
desinfekto. Interesatoj skribu al:

esperanto.klubo.prostejov@seznam.cz

La eldonejo KAVA-PECH 30-jara

la eldonejo KAVA-PECH de Petro
Chrdle estis fondita en la jaro 1992 kaj
do ĝi venontjare atingos sian tridek-
jariĝon. Tiuokaze ĝi planas solenaĵon,
kiu okazos, se tion la kovim-pandemio
permesos, **ĵaŭde la 9-an de junio 2022**
posttagmeze en la sidejo de Unio de
tradukistoj kaj interpretistoj (JTP) en
Prago, placo Senovážné 23. Dume estos
lanĉitaj ĉiuj novaĵoj produktitaj dum la
lastaj du jaroj (pli ol duono estas aŭ en
Esperanto aŭ kun rilato al Esperanto) kaj
krome estos je dispono ĉiuj eldonaĵoj de
KAVA-PECH kun sentebla porokaza
rabato. Klare ne mankos ankaŭ tosto kaj
iom da refreŝiĝmanĝetaĵo. Ĉiuj esperan-
tistoj interesiĝantaj pri literaturo estas
kore invitataj. Pli da informoj ĉe:

chrdle@kava-pech.cz

KAVA-PECH – 30 let

Nakladatelství KAVA-PECH Petra
Chrdleho bylo založeno v roce 1992,
takže v roce 2022 oslaví třicáté výročí.
Konkrétně ve čtvrtek **9. června 2022**
odpoledne v sídle Jednoty překladatelů a
tlumočnicků (JTP) na Senovážném nám.
23. Nebude chybět občerstvení ani nej-
novější publikace ke koupi. Info:

chrdle@kava-pech.cz

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".*)

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://seznoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**

Časopisy a knihy na internetu

Časopisy a knihy ke stažení:

<http://esperantobrno.cz/malnova/bitgazetoj.html>

<http://esperantobrno.cz/malnova/bitlibroj.html>

Internetový kurz esperanta, třeba pro ty, kteří si chtějí oprášit své znalosti

<https://lernu.net/cs>

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
52. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
<http://www.esperanto.cz/starto>

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117
Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2022

Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 52-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz
<http://www.esperanto.cz/starto>

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 1.21.2022

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

Ĉiun duan mardon virtualaj kunvenoj de E-
Klubo en Brno - gastoj bonvenas!
Fizikaj renkontoj en Hybešova 65a alternas kun
la virtualaj. <http://esperantobrna.cz>
info: brno@esperanto.cz

2021-12-30 Silvestro en Prostějov
Info: esperanto.klubo.prostejov@seznam.cz

2022-05-6/11 73-a IFEF-kongreso en Beroun
Info: kongreso@atlas.cz

2022-06-09 30 jaroj de KAVA-PECH, JTP
Senovážné nám. 23, info: chrdle@kava-pech.cz

2022-07-17/30 Unua etapo de SET Lančov
2022-07-31/-08-12 Dua etapo de SET Lančov
2022-08-12/14 Renkontiĝo de ekstendaranoj
info: let.lancov@seznam.cz

2022-08-06/13 Universala Kongreso en
Montrealo



2022-09-16/18 ĈEA-kongreso en Pardubice

2023-09-15/17 ĈEA-konferenco en Strážnice



120 jaroj de Esperantista klubo Brno



Inaŭguro de la ekspozicio
pri Ĉestmír Vidman en Rožmitál p. T.
(27.10.2021)
Detalan **fordokumentadon** de la ekspozicio
vi povas trarigardi en la galerio de
Muzeum.esperanto.cz sub la titolo **Ĉestmír
Vidman (1921 – 2013)**. Samloke fotogalerion
Jan Vajs en Ĉeĥio.



Ekspozicio en Havířov



En Dukovany



Klubo E-mental' feriiis en Kalabrio
(oktobro 2021)